

OOSTENDE INVITAS:

LA 48-A KONFERENCO DE ILEI

17-25 JULIO 2015



Plateso estas marfiŝo el atlantikaj profundoj, ŝate vidata sur pladoj de atlantikbordaj kuirkulturoj. Ne hazarde ĝi pruntis la nomon al la populara kaj komforta junulargastejo „De Ploate” („Plateso” en la flandra dialekto) en Ostendo (Oostende), Belgio. Kaj ne hazarde estis elektitaj: Ostendo por la konferencurbo kaj „De Ploate” por konferenĉejo kaj loĝejo de la 48a Konferenco de ILEI, 17-25 julio 2015, semajnon antaŭ la 100a UK okazonta en la proksima Lillo (Lille), Francio.

Du simbolaj 100-oj fonas la jaran ĉefeventon de ILEI en 2015: la ĉi-jara 100a datreveno de la komenco de la Granda Milito, kaj la venontjara 100a UK. La unua inspiras, ke la konferenca temo rilatu al konstruado kaj gardado de paco post la grandaj militoj, kaj la dua motivas ILEI donisian kontribuon al cerebro de la grava movada jubileo.

Ostendo kaj la ĉirkaŭa regiono konservas memorojn kaj vidobligas memor-aĵojn pri historiaj eventoj el la Unua Mondmilito, kiuj lasis



La urbestro de Ostendo, staranta dua de maldekstre, kun konferencorganizantoj de ILEI

neviŝeblajn spurojn en la vivo de ĉi tiu havenurbo, tra kiu dum jarcentoj trafikis homoj, varoj kaj ideoj el la tuta mondo. La ostenda lumturo kun la packolombo portanta en la beko la verdan stelon de esperantista pacespero radias el la proponata konferenca emblemo per la komunaj streboj al daŭripova paco 100 jarojn post la Unua kaj 70 jarojn post la Dua Mondmilitoj, kaj post ĉiuj aliaj militoj. Precipe la ILEI-simpoziaj diskutoj enkadre de la konferenco estos dediĉitaj al ĉi-koneksa temaro. La konferencaj ekskursoj gvidos konferencanojn al la Palaco de princo Karel, Atlantika Muro, Fortikaĵo de Napoleono, vidindaĵoj el la Unua Mondmilito, brusela ekspozicio de EU en 23 lingvoj kaj aliaj historiaj monumentoj kaj kulturaj vidindaĵoj en Okcidenta Flandrio, Antverpeno kaj Bruselo. La urbestro de Ostendo certigas subtenon al la konferenco, interalie monan apogon al nepagipovaj konferencanoj el malriĉaj landoj.



La proksimeco de Lille, la samjara kongresurbo de UEA, ebligas komfortan trajnveturan transiron al la jubilea UK kun la konferencaj konkludoj kaj inspiroj kiel labora kaj celebra kontribuo.

Radojica PETROVIĆ, estrarano pri konferencoj

